Enketo pri Esperanto-Asocioj kaj -Kluboj
ĉe “Unu Zono kaj Unu Vojo”

Saluton!

Karaj samideanoj!

Ni, Pekina Esperanto-Asocio de Ĉinio, lanĉis la enketon por esplori la ĝeneralan staton de Esperanto-asocioj, -societoj kaj -kluboj sur “Unu Zono kaj Unu Vojo”.

La strategio “Unu Zono kaj Unu Vojo”, t.e, la Ekonomia Zono laŭ la Silka Vojo kaj tiu de la Mara Silka Vojo en la 21a Jarcento, estas lanĉita de Ĉinio por, ke ne nur Ĉinio, sed ankaŭ landoj kaj regionoj sur la silka vojo kaj la mara silka vojo **kune ĝuu fruktojn de disvolvado de Ĉinio, prosperu ekonomie kaj estu stabilaj socie.** Per la komuna strategio, diversaj landoj fortigos kunlaboron, plivastigos disvolvan spacon, interŝanĝos kulturojn kaj interkomunikigos kaj proksimigos la popolojn, fine formos komunan komunumon de sorto kaj kune disvolviĝos.

(pli detala konigo de “Unu Zono kaj Unu Vojo” ĉe http://esperanto.cri.cn/581/2015/10/21/165s181216_1.htm)

Dank’ al la ŝanco de “Unu Zono kaj Unu Vojo”, ni, Pekina Esperanto-Asocio, volas amikiĝi kun via Esperanto-asocio/societo/klubo kaj kunagi por nia Esperanto-movado!!

Cetere, **“Unu Zono kaj Unu Vojo” ne celas nur landojn kaj regionojn**

sur la vojoj, sed ankaŭ ĉiujn amikojn, kiuj volas aliĝi. Tial al nia enketo estas bonvenaj ĉiuj Esperanto-asocioj/societoj/kluboj!

La enketo temas pri stato de via asocio aŭ societo aŭ klubo, enhavo kaj maniero de ebla kunago, ankaŭ via intereso pri Ĉinio.

Ni petas de vi fari la enketon kaj respondi la demandojn. Ni publikigos la rezulton poste anonime.

Ni preferas ricevi vian respondon antaŭ la 30a de novembro (lunde) de 2015.

Dankegon!

Pekina Esperanto-Asocio

Rimarkigo:

- bv streku vian elekton, ekzemple

  .Via asocio/societo/klubo estas

  - landa
  - regiona
  - urba
- alia (bv notu)_____

Se vi ne scias kion skribi, lasu ĝin malplena.

Stato de Via Asocio /Societo/Klubo

1. Nomo kaj adreso de via asocio/societo/klubo

_____

2 .Via asocio/societo/klubo estas

- landa
- regiona
- urba
- alia (bv notu)_____

3. Via asocio/societo/klubo fondiĝis en ___tago___monato____jaro

4. Membroj de via asocio/societo/klubo

(bv plenigu la subajn framojn per ciferoj)

Aĝoj (jaroj)	N-ro
1-10	
11-20	
21-30	
31-40	
41-50	
51-60	
61-70	
71-80	
81-90	
91 kaj pli	

sume	
averaĝa aĝo	

Genro	N-ro
viro	
virino	

Edukiteco	N-ro
malpli ol licencio	
licencio	
magistro	
doktoro	
pli ol doktoro	

Profesio	N-ro
lernejano	
instruisto	
sciencisto	
artisto,verkisto, muzikisto, kantisto, pentristo	
ĵurnalisto	

fotisto	
registara oficisto	
komercisto	
inĝeniero	
juĝisto	
soldato, policano	
emerito	
aliaj (bv notu)	

5. Kiom ofte la membroj de via asocio/societo/klubo fizike renkontiĝas?

- neniam
- ne regule
- unu fojo en jaro
- unu fojo en du jaroj
- unu fojo en tri jaroj
- unu fojo en monato
- du fojoj en monato
- tri fojoj en monato
- kvar fotoj en monato
- pli ol kvar fotoj en monato
- aliaj (bv notu)_____

6 Kiu(j) evento(j) ludas gravan rolon en la vivo de la asocio/societo/klubo?

(pluraj respondoj eblas)

- vizaĝ-al-vizaĝa renkontiĝo
- prelego
- kultura lingva festivalo
- ekspozicio
- legado
- muzikfestivalo aŭ simila muzika evento
- turismo
- kongreso
- konkurso (bv aldonu la nomon de konkurso)
- leciono de Esperanto
- aliaj (bv notu)_____

Estas bonvena konigi karakteriza(j) n evento(j)n:

_____

_____

7. Via asocio/societo/klubo havas bonajn rilatojn/kontaktojn kun

(pluraj respondoj eblas)

- amaskomunikilo (ĵurnalo, radio, televido aŭ retejo)
- universitato/akademio/liceno/lernejo
- kompanio/entrepreno
- NGO (neregistaraj organizoj)

- loka registaro kaj oficiala(j) fako(j) (urbodomo, muzeo ktp.)
- alia (bv notu)_____

8. Ĉu via asocio/societo/klubo havas fejsbukan paĝon?

- Jes, ĝia adreso estas_____
- Ne.

Kontakto kun Aliaj Asocioj/Societoj/Kluboj

1. Ĉu vi volas kontaktiĝi kun aliaj kluboj, societoj kaj asocioj?

- Ne
- Jes
- Ne scias.

Se via respondo estas "Ne" aŭ "Ne scias", vi povos direktiĝi al la tria parto "Intereso pri Ĉinio"

2.Kun kiom da asocioj/societoj/kluboj vi amikiĝis kaj regule kontaktiĝas?_____

3. Kiujn kampojn vi preferas en kunlaboro kun aliaj kluboj aŭ asocioj aŭ societoj?

(pluraj respondoj eblas)

- edukado de Esperanto
- trejnado de aktivuloj

- reklamado de Esperanto al la publiko
- ekonomio/financo
- sporto
- eldonado
- kultura interŝanĝo
- turismo
- aliaj (bv notu)_____

4. Kiamaniere vi preferas kontakti aŭ kunlabori ? **(pluraj respondoj eblas)**

- regula renkontiĝo aŭ kongreso (kiel kelklanda komuna seminario, regiona renkontiĝo…)
- **NE** regula renkontiĝo aŭ kongreso
- regula interreta kontakto (kiel regula skajp-babilado)
- **Ne** regula interreta kontakto
- aliaj (bv notu)_____

Intereso pri Ĉinio

1. Ĉu vi interesiĝas pri Ĉinio

- Jes
- Ne
- Ne scias

2 Kion vi celas per kontakto kun ĉinaj Esperanto-asocioj/societoj/kluboj?

- fari komercon
- utiligi ambaŭflankajn resursojn
- fari kulturan interŝanĝon
- reklami Esperanton
- varbi membrojn kaj trejni aktivulojn
- instrui Esperanton
- eldoni librojn kaj diskojn
- aliaj (bv notu)_____

3 Ĉu vi konas la strategion de “Unu Zono kaj Unu Vojo”?

- Jes, antaŭe mi jam sciis ĝin.
- Nun pro via enketo mi scias ĝin.
- Ne

4 Kian opinion vi havas pri “Unu Zono kaj Unu Vojo”

- Bona ideo, de kiu niaj lando kaj popolo povos profiti.
- Bona ŝanco por ni, esperantistoj.
- **Eble** bona ŝanco.
- **Tute ne** interesiĝas.
- Ne scias.
- aliaj (bv notu)_____

Fine, bv skribu nomon kaj kontakt-manieron de kontaktanto de via asocio/societo/klubo_____

Dankegon pro via subtenado kaj helpado!

Kontaktanto: Zhang Ping (Ĝoja)

Retadreso: perfectgoja@163.com

Fejsbuka adreso: https://www.facebook.com/pekinogoja

Novembro, 2015, Pekino.

Pekina Esperanto-Asocio

Historio:

Antaŭ pli ol cent jaroj Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion, de tiam Esperanto intime rilatas al la ĉina socio. Post la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko, la registaro ĉiam subtenas Esperanto-movadon en Ĉinio.

Pekina Esperanto-Asocio (PEA) fondiĝis en la 25-a de januaro 1981. Ĝi estas organizo, gvidata de la Pekina Federacio pri Socisciencaj Rondoj kaj direktata de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL).

Membroj:

Ĝi nun havas pli ol 80 membrojn kaj en la pasintaj jaroj estis plurfoje premiita de ĈEL kaj de la Pekina Federacio pri Socisciencaj Rondoj.

Celo:

Unuigi kaj organizi pekinajn e-istojn por studi, apliki, diskonigi kaj popularigi Esperanton; altigi la lingvonivelon de la membraro, elbaki novajn elstarajn esperantistojn; starigi rilatojn kun en- kaj ekster-landaj E-organizoj kaj malfermi eksterajn kultur-interŝanĝojn por fortigi la amikecon kun diverslandaj e-istoj; apliki Esperanton por servi al la reformado kaj pordmalfermo kaj por modernigado de la municipo Pekino.

Aktivadoj en Ĉiu Jaro:

I. Novjara Tekunveno

Okazigi Tekunvenon alinome Konsilian Kunvenon por diskuti laborplanon de la asocio en la nova jaro;

II. Celebro en Zamenhof-tago

Ĉe la naskiĝtago de L.L.Zamenhof okazigi celebron kaj la labor-raportan kunvenon en jarofino. Ekzemple ĉijare okazos oratora konkurso.

III. Somera/ Aŭtuna Kampado

Kun celo paroligi la kampadanojn en Esperanto ; lastajn jarojn Pekina Espreanto-Asocio kune kun Tianjin-a Esperanto-Asocio kunaranĝis someran/aŭtunan renkontiĝon. Ĉijare la du asocioj organizis karavanon al Seulo kaj partoprenis en la 47a Esperanto-Kongreso de Koreio.

IV. Prelegoj

Por reklami Esperanton al la publiko, membroj de Pekina Esperanto-Asocio prelegas pri Kultura Diverseco, kaj partoprenas en la aktivado de la Pekina Federacio pri Socisciencaj Rondoj “Semajno de Popularigo de Sociaj Sciencoj en Pekino”;

V. Forumo

Partopreno en la Forumo de Akademia Avangardo per Esperanta Forumo; La 12an de decembro en 2015 okazos la kurantjara forumo kaj publikigos disertaciojn el 12 esperantistoj el Pekino, Ŝanhajo, Nanchang kaj Xi’an.

VI. Monata Renkontiĝo

Okazigi Tekuvenon en la lasta sabato de ĉiu monato por liveri ŝancojn paroli kaj lerni la lingvon kaj interŝanĝi informojn de Esperantujo;

VII. Eduko

Ĉiusabate funkcias Esperanto-Kurso en Pekina Lingva Universitato. Li Weilun (Ĉinio) kaj Usui Hiroyuki (Japanio) respektive faras instruadon al komencantoj kaj meznivelaj lernantoj. Krome, Pekina Esperanto-Asocio faris serion da film-kursoj por Nankai-Universitato en Tianjin, ankaŭ instruas Esperanton en elementa lernejo.

Retadreso: pea126@126.com

Telefona numero: +86-10-51667856

Adreso: N.19, Vojo Anwai Xibinhelu, Distrikto Oriento, Pekino, Ĉinio.

(ĉine) 中国北京市东城区安外西滨河路 19 号

Wechat: Verda Pekino